


Eŭropa Bulteno

Novembro 2014, Numero 143

MALFACILA VOJO DE EPOKFARA SUKCESO



senatano prof. dr hab.
Edmund Wittbrodt



ministro de kulturo kaj
nacia heredaĵo
Małgorzata Omilanowska



ano de Pola Societo EDE
Kazimir Krzyżak

La 20-an de novembro 2014 sendube enskribiĝos en historion de la monda esperantista movado, kiel escepta tago – tago de epoka sukceso de la lingvo Esperanto. En tiu ĉi tago ni neoficiale eksciis, ke la ministrino pri la kulturo kaj nacia heredaĵo, prof. dr hab. Małgorzata Omilanowska la 31-an de oktobro 2014 akceptis apogon de la kapitulo de tiu Ministerio rilatan al propono prezentita de EDE-PL enskribi la lingvon Esperanto sur la liston de la Pola nemateria kulturheredaĵo kaj tiun proponon subskribe legaligis. Oficiala, solena anonco de tiu ĉi fakto estas planata en plej proksima tempo kaj okazos en varsovia reĝa kastelo. Por la solenaĵo oni planas inviti interalie prezidantojn de ĉiuj polaj regionaj esperantistaj organizoj.

La gvidanto de la Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton – la senatano prof.dr hab. Edmund Wittbrodt, kiu estas patro de tiu ĉi sukceso, escepte amike, bonvoleme rilatas al la ideo de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto. Li bedaŭras, ke ĝi estas ne aprezata kaj faras ĉion por ŝanĝi tian sintenon. Li anoncis, ke en la plej proksima tempo li organizos kunvenon de la parlamenta grupo apoganta Esperanton, al kiu li intencas inviti ĉiujn prezidantojn de la polaj regionaj esperanto-asocioj kaj ankaŭ aliaj elstaraj esperantistoj por priparoli realisman planon de agadoj, kiuj permesus utiligi tiun ĉi gravegan fakton al disvastigo de Esperanto ne nur en Pollando sed ankaŭ en la mondo.

Se esperantistoj konsentas kun mi, ke la enskribon de Esperanto sur la liston de nemateria kulturheredaĵo de Pollando oni povas agnoski kiel epokan okazaĵon en la monda Esperanto-

movado, ni devas konsci, ke por tion eluzi, ni ne povas kalkuli pri aliaj, ke malfacilan laboron faros iu alia. Multaj honestaj esperantistoj devos nun „kuspi manikojn” kaj komenci fidinde, konkrete labori por realigo de revoj de la kreinto de la lingvo – Ludoviko Zamenhof ke Esperanto ne nur ebligu al la homaro facilan interkompreniĝon, sed ankaŭ permesu vivi konkorde kaj amikece.

En tiu ĉi loko mi permesas al mi respondi al iuj personoj, kiuj demandis, ĉu estas ĝuste enskribi Esperanton sur la polan liston de kulturheredaĵo, ĉu tio ne negas la neŭtralecon de la lingvo. Unue ni memoru la deklaron de Zamenhof ke Esperanto kiel lingvo neutrala kaj apartenanta al la tuta homaro estas neŝanĝebla kaj neniu rajtas ĝin ŝanĝi. Tamen estas ankaŭ fakto, ke Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko, vivis kaj laboris en Varsovio, do sur la pola tero. El Pollando eliris lia ideo kaj estis entuziasme akceptita en la mondo. Do ĝi fariĝis samtempe kulturheredaĵo de la mondo. Estas sekve ĝuste ke el la pola tero, kiel parteto de Eŭropo kaj la mondo devenas la unua enlistigo de la lingvo sur la liston de kulturheredaĵo. La sekva paŝo apartenas jam al esperantistoj de Eŭropo kaj la mondo. Esperantistoj de Eŭropo kaj la mondo faru ĉion eblan por ke post tiu ĉi unua paŝo, kiel eble en plej proksima tempo la lingvo Esperanto estu agnoskita kiel kulturheredaĵo de Eŭropo kaj la mondo.

Neniu sukceso venas facile, ĉiu naskiĝas post grupa peno kaj laboro. Tiu ĉi sukceso ankaŭ naskiĝis ne sendolore. Estas ja eterna vero, ke ĉiu sukceso havas multajn patrojn, verajn kaj tiujn, kiuj volonte ĝin alproprigas. Nur malvenkoj restas orfaj. Tiu principo ne preterpasos ankaŭ tiun sukceson. Permesu, ke mi kiel eble plej honeste prezentu nepridiskuteblajn aŭtorojn de tiu ĉi sukceso. Mia pritakso povas esti subjektiva kaj diferenci de opinioj de aliaj, ĉar ja neniu estas senerara.

La plej grandaj meritoj apartenas al la senatano prof. dr hab. Edmund Wittbrodt – gvidanto de la parlamenta grupo apoganta Esperanton, kiu plenumas siajn promesojn. Li evidentiĝis la plej konsekvenca apoganta ideon de Esperanto. Grandan meriton havas ankaŭ la ministrino pri kulturo – prof. dr hab. Małgorzata Omilianaowska kaj la tuta teamo de bonvolemaj personoj, engaĝitaj pri la afero: sinjorinoj Joanna Cicha-Kuczyńska, Julia Włodarczyk, Katarzyna Sadowska-Mazur; sinjoro Bartosz Skaldowski kaj la tuta teamo de la ministeria Kapitulo, nekonataj al mi laŭ la nomoj, kiuj montris komprenemon por la graveco de la lingvo Esperanto por la pola kulturo. Tute certe distingon meritas ankaŭ la laborgrupo de EDE-PL, kiu prilaboris la proponon – koleginoj: Daniela Gizela Matray, Dorota Burchardt, Halina Komar kaj kolegoj: Antoni Walaszek, Edward Kozyra kaj mi, kiu iniciatis la prilaboron de la propono.

Granda merito pri la legaligo de la propono apartenas ankaŭ al multaj ekspertoj, kiuj pozitive kaj laŭde apogis la proponon, institucioj, kiuj institucie ĝin apogis kaj ankaŭ al ĉiuj, kiuj subskribis peticion pri apogo de la propono. Estis kolektitaj multe pli ol 1.600 subskriboj. Apartmaniere kontribuis al tiu ĉi venko ankaŭ skeptikuloj, kiuj neglekte, maleme kaj nekredeme traktis la klopodojn kaj la proponon mem, eĉ tiuj, kiuj reale provis malhelpi. Per sia malamika sinteno ili instigis la aŭtorojn de la propono al pli intensa laboro por sukcesi kaj malebligi al skeptikuloj diri: „Ĉu ni ne aŭguris tion?”

En tiu ĉi loko mi devas kun granda bedaŭro konstati, ke la proponon ne apogis institucie la urboj strikte ligitaj kun la vivo kaj agado de L.L.Zamenhof – Bjalistoko kaj Varsovio. Mi sendis trifoje peton al la urbestro de Bjalistoko – Tadeusz Truskolaski, bedaŭrinde ili restis sen respondo. Similajn ekzemplojn mi povus doni pli multajn. Por montri kiel dorna vojo kondukas al similaj sukcesoj mi ŝatus aldoni nur kelkajn el multaj miaj personaj spertoj. Sed

ne por fanfaroni pri mia agado, sed por instigi aliajn al similaj streboj. Mi sincere konfesas, ke mi ne apartenas al apartaj talentuloj kaj envias esperantistojn bonege regantaj la lingvon Esperanto, ĉar mi, kvankam konvinkita pri ĝia facileco, mem scias ĝin nur kontentige. Esperanto fascinis min ne ĉefe kiel lingvo, sed ĝia grandioza interna ideo, ideo pri proksimigo de homoj de diversaj lingvoj, kulturoj kaj aliaj diferencaĵoj.

Bedaŭrinde, la afero pri la realigo de tiu ĉi belega ideo en la esperanta mondeto ne statas plej bone. Mi tamen kredas esencan esperantan principon, ke: „Eĉ guto malgranda konstante frapante traboros la monton granitan”. Mi jam imuniĝis je malicaj epietetoj, per kiuj pridonacas min tre bonaj, sed enviemaj esperantistoj. Mi klopodas konduki obeeme laŭ mia konscienco, honeste kaj laŭ mia ebleco noble. Kaj antaŭ ĉio favore al Esperanto. Mi konfesas, ke jam ne unufoje, pro nehalteblaj intrigoj kaj mensogoj kontraŭ mi, mi havis momentojn de psika deprimado kaj emon rezigni pri poresperanta agado. Antaŭ nelonge mi eĉ komunikis tion al la senatano prof. Edmund Wittbrodt, kiu kategorie malkonsilis al mi fari tion. Kaj mi subiĝis al lia konsilo.

Eble tio sonas iom malmodeste, sed plenrespondece mi povas aserti, ke signifa plimulto da sukcesoj de la pola asocio EDE-PL estas pro mia laboro. Mi atingis tion danke al apogo de organizoj. La listo de miaj atingoj estas tre longa. Mallonge mi mencias nur tri plej gravajn ekzemplojn:

1. En la jaro 2008 mi dediĉis min al la klopodoj, por ke UEA estu prezentita al nobelpremio; en la jaro 2008 kiam la asocio festis sian 100-an datrevenon. Pro tio mi sendis petojn al 33 parlamentanoj, senatanoj kaj eŭroparlamentanoj. Tio efikis per ĉiuvoĉa akcepto de konvena rezolucio fare de la Pola Parlamento la 12-an de junio 2008, la rezolucio apoganta klopodojn proponi UEA por nobelpremio por la paco. Tiam mi kontaktis koresponde 69 gravulojn. Pro tio la 18-an de decembro 2008 mi ricevis de la vicmarŝalo de la Pola Parlamento, Jerzy Szmajdziński jenan mesaĝon:

Estimata Sinjoro,

Mi havas por vi agrablan kristnask-novjaran donacon. Kun plezuro mi povas informi vin, ke la oficejo pri internaciaj aferoj de la Pola Parlamento sendis la parlamentan rezolucion, rilatan al honorigo de la 100-a datreveno de estiĝo de Universala Esperanta Asocio al Nobelkomitato. Mi estas konvinkita, ke via kontribuado por la sukcesa finiĝo de tiu proceduro estas ne malgrava. Mi plene aprobas vian engaĝigon kaj persistecon.

Estime,

Jerzy Szmajdziński

2. Mi ligis 45 korespondajn rilatojn, multaj el ili estis personaj kontaktoj kun parlamentanoj, senatanoj kaj eŭroparlamentanoj de diversaj politikaj orientiĝoj. Tiuj kontaktoj efikis jene:
 - dufoja parlamenta interpelacio al Ministro de Edukado rilate al enkonduko de instruado de Esperanto en lernejoj, en 2009 fare de parlamentanino Krystyna Łybacka kaj en 2014 fare de parlamentano Robert Biedroń;
 - dufoja deklaro pri preteco fare de la eŭroparlamentanoj partopreni en Universalaj Kongresoj de esperantistoj. La unuan fojon tion pretis fari eŭroparlamentano Janusz Lewandowski kaj partopreni en la UK en Havano-Kubo en 2010 kaj la duan fojon du eŭroparlamentanoj: Joanna Katarzyna Skrzydlewska kaj Jan Kozłowski pretis iri al la UK en Kopenhago en 2011.Bedaŭrinde ambaŭ iniciatoj estis malebligataj fare de Universala Esperanta Asocio.

- dufoja publikigo sur la interreta paĝo de Pola Prezidenteco en Eŭropa Unio de artikoloj pri Ludovko Zamenhof: la 26-an de julio 2011 kaj la 14-an de decembro 2011.
- pro multaj skribdokumentoj direktitaj al la parlamentaj kaj senataj marŝaloj kaj multaj parlamentanoj, pro multaj personaj interparoloj kun parlamentanoj, inter ili kun la plej efika – la senatano Edmund Wittbrodt, la 17-an de decembro 2012 estis fondita parlamenta grupo apoganta Esperanton sub gvido de la senatano Edmund Wittbrodt. Ĝian inaŭguran malfermon mi havis plezuron partopreni kune kun Etsuo Miyoshi. Tiu grupo jam povas fieri pro la organizo de la senata konferenco okaze de la 125-jariĝo de Esperanto kaj esperanta ekspozicio, kiu post la ekspono en la Senato estis montrita en multaj urboj kaj daŭre krozas. Tamen la plej gravaj atingoj de tiu ĉi grupo tutcerte apartenas ĉi-lastata gravega okazintaĵo, pri kio s-ro senatano informis min per jena mesaĝo:

Estimata Sinjoro Kazimiro,

Ĵus mi ricevis informon, ke Esperanto estis enskribita sur la liston de la pola nemateria kulturheredaĵo. Via merito en tio estas granda!

Mi salutas,

Edmund Wittbrodt

3. Okaze de la 125a datreveno de Esperanto mi intense klopodis kaj persone skribis proponojn pri honorigo per gravaj ŝtatordenoj por jenaj esperantistoj: Etsuo Miyoshi, Jozef Golec (tiun ankaŭ nomumi “Honora civitano de la urbo Cieszyn”), Antoni Walaszek, Ireneusz Wilczyński, Edward Jaśkiewicz kaj Edward Kozyra. Krom tio mi instigis eksprezidanton de EDE-PL Franciszek Witucki, por ke li skribu proponojn por Eugen Macko kaj Stanisław Rynduch. Ĉiuj supre menciitaj distingojn ricevis.

Similajn atingojn mi havas multajn. Mi skribis pri tio ne por fanfaroni pri miaj faroj, sed por montri, ke ĉiu esperantisto (mi estas nur ano de EDE-PL), se li/ŝi nur emas, povus simile agi, kio sendube portus multe pli da konkretaj atingoj por Esperanto. Preskaŭ en ĉiu eŭropa urbo estas parlamentanaj oficejoj, en kiuj parlamentanoj akceptas la voĉdonantojn. Inter tiuj parlamentanoj estas ankaŭ tiaj kiel senatano Edmund Wittbrodt, kiuj amike rilatas al Esperanto. Ju pli multajn ni sukcesos konvinki apogi Esperanton, des pli rapide realiĝos la celoj de la E-movado.

Se estraroj de UEA kaj landaj Esperantaj Asocioj pli kuraĝe kaj efike agadus, similaj gravaj atingoj estus jam pli multaj. Ja institucioj havas pli da eblecoj efike agadi ol unuopa simpla esperantisto.

Do mi varmege apelacias al ĉiuj esperanto-asocioj kaj esperantistoj de Eŭropo aktiviĝi pli por la bono de Esperanto kaj ĝia rapida disvastigo en la mondo. Ĉesu malaktive rigardi kiel Esperanto mortas. Revigliĝu ĝin! Ĉesigu ĉiujn intrigojn, kverelojn malindajn por esperantistoj. Fariĝu veraj, sin reciproke apogantaj esperantaj amikoj.

Kazimierz Krzyżak

LABORPLANO DE EEU POR 2015

Post skriba diskuto pri la propono de la laborplano okazinta en novembro 2014 la estraro de EEU akceptis la laborplanon de EEU por la jaro 2015. Jen ĝi en mallonga formo por ke la landaj asocioj povu sekvi la planon, eventuale sugesti ŝanĝojn kaj mem kontribui al ties realigo.

1. Ellaboro de 2-3 novaj projektoj baze de konkursoj de Eŭropa Komisiono kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Europo por civitanoj kaj Erasmus+
2. Kontaktado de instancoj en Viŝegradaj landoj por aranĝi temkonferencon de landoj V4+ pri lingva kaj kultura maljusto en EU dum la 101-a UK en Nitra en 2016, en kiu partoprenos kune politikistoj, ligvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj.
3. Kontaktado de instancoj en Viŝegradaj landoj kun la iniciato organizi interregistaran konferencon de V4+ pri "Kultura kaj lingva dimensio de EU" en 2017.
4. Klopodi atingi konsenton de Euroscola en Strasburgo organizi unu specialan eksperimentan sesion de Euroscola en kiu oni uzus nur Esperanton kaj la anglan.
5. Organizo de la Asembleaj kunsidoj de EEU kaj prezento de la agado de EEU dum la UK en Lille en Francio.
6. Finrealigo de la eŭropa projekto „lingvo.info“ laŭ la akceptita plano de la projekto (finraporto kun financa raporto, financa finbilanco kaj fintradukoj kune kun la 8 partneroj). Informado pri la paĝaro lingvo.info.



7. Plua okupiĝado pri diskonigado de esperanta teksto de eŭropa himno inter korusoj de Eŭropa Unio.
8. Pluaktivi en Eŭropa civitansocia platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I.
9. Eldoni libron paperforman pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 28 artikoloj pri la movadoj en 28 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2013.
10. Organizo de podia diskuto kadre de Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) komence de septembro 2015 kaj aktiva partopreno en la Forumo kun aparta atento al informa agado. Tiusenca kunlaboro kun UEA.
11. Partopreno de EEU-reprezentantoj en proksimume 5 diversaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.
12. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en deko da konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU.



13. Inicito de agadoj far Landaj Asocioj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro): publikaj prelegoj pri lingva stato en Eŭropo, ekspozicioj pri Esperanto, informado pri lingvo.info, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj – tradukoj al malpli grandaj lingvoj...
14. Inicito de agadoj far Landaj Asocioj okaze de Tago de Gepatraj lingvoj (21-a de februaro): Disvastigo de konkludoj de Eŭropa civitansocia platformo por antaŭenigo de multlingveco per prelegoj kaj rondaj tabloj.
15. EEU-kunlaboro kun diversaj internaciaj kaj eŭropaj Esperanto-organizoj kiel UEA, TEJO, AVE, EDE, AEK, ILEI ktp.

16. Starto de ellaboro de lernomaterialoj por infanoj de antaŭlerneja aĝo per kiu oni dum unu jaro instruus propedeŭtikgravajn elementojn de Esperanto kun la celo prezenti tiun materialon al la Platfortmo pri multlingvismo. Starigo de laborgrupo por tiu celo.

17. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj) en elektronika formo kun publikigo en nia EEU-paĝaro.

18. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU: www.europo.eu

19. Organizo kaj preparo de du estrarkunvenoj (en Lille kaj en Bruselo)

20. Pluserĉo kaj aktivigo de sponsoraj landaj asocioj por helpi al landaj asocioj en krizo. Fortaj landaj asocioj kiuj transprenos sponsorecon super iu el la malfortaj movadoj, devus financi restadon de 2 gejunuloj el tiuj landoj en Somera Esperanto-Studado en Slovakio (Nitra, julio 2015)

21. Realigo de kampanjo pri enkonduko de identa kurso por komencantoj laŭ la Zagreba metodo per reta lernolibro, kiun kunordigas la sekretario de EEU en laŭeble multaj paĝaroj de LAoj en EU.

Estraro de EEU

ZAMENHOFTAGO 2014

Nia tradicia Zamenhoftago en 2014 havas apartan kromnuancon. Temas pri 155-jariĝo de la naskiĝo de Zamenhof kio donas al ni la eblon iom pli okupiĝi pri Zamenhof rilate la eksteran publikon. Oni povas atentigi la publikajn rimedojn pri tiu monda gravulo sendante jam pretan artikolon kaj krome atentigi pri vikipediaj artikoloj pri li, kiuj ja troviĝas en tre multaj naciaj lingvoj. Se via nacilingva vikipedio ne havas sufiĉe ampleksan artikolon, vi povas aktivigi por plibonigi tion.

Krome, lige al la Zamenhoftago ni nepre ligu ankaŭ la 60-jariĝon de la Rezolocio de UNESCO dediĉita al Esperanto kaj akceptita la 10-an de decembro 1954 en Montevideo. Ĉar la 10-a de decembro estas ankaŭ la Tago de Homaj Rajtoj, oni atentigu pri homa rajto uzi kaj lerni en la gepatra lingvo kaj pri justa lingva traktado.

Se vi ligas al tio ankaŭ iun nacian au lokan gravan personon kiu festas iun jubileon, jen sufiĉaj kaŭzoj ke vin vizitu aŭ intervjuu iu loka ĵurnalo, radio aŭ televido. Ĝustatempe (kelkajn tagojn antaŭ via aranĝo) sendu inviton al la ĵurnalistoj kun nacilingve preta artikolo pri jubileo kiujn vi festas.

Zlatko Tišljariĉ

LA UK EN NITRA KUN SPECIALA POŝTMARKO KAJ ŜTATESTRA PROTEKTO

La preparlaboroj por la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en la slovaka urbo Nitra komenciĝis kaj jam kondukis al du gravaj sukcesoj.



Lige al la UK en Nitra okazos nekutima en la nuna epoko evento: eldono de porokaza poŝtmarko kun Esperanto-rilata temo. La ĝenerala direktoro de la Slovaka Poŝto, inĝ. Tomáš Drucker konfirmis tion en letero al Stano Marček, en kiu li skribis pri la intenco eldoni du poŝtmarkojn en 2016, kiam Slovakio unuafoje funkcios kiel la prezida lando de Eŭropa Unio. Jam pli frue estis decidite, ke la

unua marko estos dediĉita al "ŝtat-reprezentaj aferoj", sed la dua ankoraŭ ne havis specifan temon. *"Tial ni bonvenigas vian iniciaton eldoni poŝtmarkon okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu same okazos ĉe ni la unuan fojon"*, skribis inĝ. Drucker, aldonante, ke *"per komunaj fortoj ni sukcesos videbligi nian landon ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la mondo"*.

– La komunan fortostreĉon esprimas ankaŭ la simbola gesto, laŭ kiu s-ro Andrej Kiska, prezidento de Slovakio, akceptis la inviton de Slovacia Esperanto-Federacio, SKEF fariĝi la alta protektanto de la 101-a UK. S-ro Kiska estis elektita kiel ŝtatestro ĉi-jare kaj plenumas la 5-jaran oficon ekde la 15-a de junio.

laŭ gk de CO de UEA

ESPERANTISTAJ GRUPOJ EN HISPANIO

En la retejo de Hispana Esperanto-Federacio ni aktualigis la liston de grupoj esperantistaj agantaj en Hispanio, lokaj, regionaj aŭ eĉ fakaj, kelkaj el kies informoj estis malaktualaj. Vidu ilin ĉi tie: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/grupos-en-espana>

Notu ke ne ĉiuj grupoj tie aperantaj estas asociaj membroj de HEF. Tial, ni ŝanĝis la titolon, kaj simple ordigis laŭ kodo de provinco de la sidejo. Do, se iu alia grupo aktivanta en la Regno, sendepende de karaktero, deziras aperi en la paĝo, bv. sciigi nin pri tio, kaj sendu viajn datumojn. Memoru ankaŭ ke se asocio deziras havi retadreson aŭ retpaĝon ĉe esperanto.es (kiel fakte kelkaj jam havas), oni devas nur peti.

José Antonio del Barrio
Federación Española de Esperanto (HEF)

JARFINA FESTO EN KASTELO GREZILJONO

Atelieroj



Magio: Venu malkovri la bazojn de la magio kaj lerni facile fareblajn magiaĵojn por por mirigi viajn amikojn.

Ĵonglado: Ateliero kiu ebligas al la infanoj manipuli diversajn objektojn de ĵonglado: pilkoj, klaboj, diabloj, ringoj, diablobastonoj, pojoj, koltukoj...

Makrameo: La bazoj de makrameo ne plu havos sekreton por vi, venu lerni kaj malstreĉiĝi kun Sofia.

Kalaripajat: Malkovru tiun batalarton tre

malnovan originan de la sud-Barata ŝtato Keralo. Kunportu komfortan vestaĵon.

DĴ: Venu miksi muzikpecojn. Ni provizas la materialon. Limigitaj lokoj por 5 personoj.

Vesperaj animadoj

Bobeloj: Dum flugo de bobelo, rilaksiĝu, revu kaj albordiĝu en nekutima vehiklo farita el sapovezikoj kaj imagpovo. Flugu al fea universo popolita de gigantaj sferoj leĝeraj kaj brilantaj...

Magio ĉea: La magio venas al vi por momento de eskapo kaj malstreĉiĝo tuj antaŭ viaj okuloj! Tiu animado multe logas, kaj la malgrandajn, kaj la grandajn. Temas pri magio kun kontakto, la magiisto troviĝas antaŭ la la persono por bone montri al ŝli la lertan ruziĝon de la magiaĵo.

Koncerto de ĴanManu sabaton, la 3an de januaro 2015. ĴanManu estas aŭtoro, komponisto, kantisto.

E-programo

Esperanto-kurso kun François: metodo adaptita al la nivelo de la lernantoj.

Foto-ateliero kun Joël: Kiel komponi bildon. Ekzercoj ekstere laŭ vetero. Kunportu fotilon. Amuzaj rakontoj rakontitaj de Raymonde.

Silvestra Festeno: la 31an de decembro vespere

Kostum-balo. Vestaĵ-kodo laŭ la jaroj 1950 ĝis 1960. La kastela dekorado venas el la 50-60-aj jaroj, ĉiuj ĝojaj gajuloj bonvolu kunporti vestaĵon el tiu epoko.

gresillon.org/jarfino[†]

Reta aliĝilo kun prezalkulo kaj pagomanieroj: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique21>

Isabelle Nicolas

EKSPozICIO EN POŝTEJO DE LUBLINO



En la Ĉefa Poŝtoficejo en Lublin, Pollando, estas nova esperanta ekspozicio. Oni povas vidi tie bildojn faritajn de lernantoj de lokaj lernejoj, okaze de la konkurso "Esperanto, lingvo de amikeco". Kvar el la plej bonaj verkoj troviĝas sur la novaj poŝtkartoj, aĉeteblaj en poŝtoficejoj!

Ania Laskowska

PLEDO POR LINGVA DIVERSECO

En Bruselo la 25-an de novembro oni montris filmon pri lingva konflikto en Kebekio kaj organizis postan diskuton pri tiu temo. La diskuto okazis en la franca. Estis ege interesa vespero, sed nur 20 homoj venis. La filmo pri Kebekio dauris 2 horojn kaj estis ege pensiga. Temis pri la daŭra konflikto pri lingvo kaj la aroganteco de la anglalingva malplimulto, kiu foje montras malamegon por la franca lingvo kaj franclingvuloj.

Poste estis diskuto. Mi taksis ke ne estus bone paroli pri Espeanto. Mi diris kelkajn vortojn publike pri la dominado de la angla en la EU-institucioj nuntempe, pri la nejusteco de tio, kaj por diri ion pozitivan, mi informis ke la unua parolado de Jean-Claude Juncker al la Europa Parlamento kiel Prezidanto de la Komisiono havas 12 paĝojn en la franca, 2 en la germana kaj nur 1 paĝon en la angla. Mi konas ĝin bone ĉar ni irlandigis la tutan tekston. Tamen poste en privataj diskutoj mi menciis Esperanton.

Seán Ó Riain

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de novembro 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Kazimierz Krzyżak, Zlatko Tišljár, José Antonio del Barrio, Isabelle Nicolas, Ania Laskowska, Seán Ó Riain, CO de UEA

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

